

ILEI – Komitatkunsidoj – Julio 2013 – Sieber  
Kunsido 1<sup>a</sup>, 14an de julio, 9h15-10h45

Protokolanto: Duncan Charters

Dum la unua kunsido de la Komitato de ILEI, ni tralaboris punktojn 1-10 de la proponita tagordo por la unua tago.

ILEI KONFERENCO 2013  
SIEBER – HERZBERG  
TAGORDO

1. SALUTADO. BONVENIGO
2. AKCEPTO DE LA TAGORDO
3. KONTROLADO DE LA VOĈOJ, KONSISTIGO DE LA KOMITATO KAJ DE KVORUMO
4. ELEKTO PRI PROTOKOLANTO
5. DECIDO PRI NOMBRO DE VOĈDONOJ POR ĈIU KOMITATANO
6. DECIDO PRI ORGANIZA TEAMO POR LA TUTA KONFERENCO
7. STARIGO DE LABORGRUPOJ
8. JARRAPORTO 2012
9. SEKCIAJ RAPORTOJ 2012
10. FINANCA RAPORTO 2012
11. DISKUTO PRI LA RAPORTOJ
12. SENŜARĜIGO DE LA ESTRARO POR 2012
13. REKONSISTIGAJ ELEKTOJ

1. **Salutis, bonvenigis** kaj gvidis la diskutadon la Vicprezidanto kaj Aganta Prezidanto Zsófia Kóródy en kunlaboro kun demisiinta Prezidanto kaj Estrarano Stefan MacGill.

2. La **proponita tagordo** estis unuanime akceptita.

3. **Kontrolo de kvorumo:** oni konstatis la ĉeeston de sufiĉaj reprezentantoj por superi la minimumon (21), kun la eblo de ĝis 34 rajtigitaj voĉoj. Prizorgis la kontroladon de komitatanoj kaj anstataŭantoj Monique Arnaud kaj Marc Cuffez.

4. Kiel **protokolanto** de la Komitat-kunsidoj estis elektita Duncan Charters. Okaze de neeblo ĉeesti ĉiujn kunsidojn aŭ protokoli ilin, anstataŭanto estos elektita surloke.

5. Estis konsentite ke laŭ la aprobita proceduro, **KOMITATANO havu la rajton esti reprezentata** en kiu ajn formo, ankaŭ de neloganto de la reprezentata lando, ke voĉoj estas transdoneblaj, kaj ke ĉeestanta Komitatano rajtas reprezenti de 1 ĝis maksimume 4 voĉoj.

La Komitato konfirmis la ĉeeston de 34 rajtigitaj voĉoj. Decidite voĉdoni per levitaj fingroj indikantaj la nombron de la voĉoj. Paperaj balotiloj haveblos okaze de sekreta balotado.

### ***Propono 1<sup>a</sup>:***

Ke reprezentanto rajtu ne voĉdoni same per ĉiuj rajtigitaj voĉoj, se tiu reprezentanto scias ke la neĉeestanta Komitato havus malsaman opinion pri la decidota afero. La Komitato decidis ***kontraŭ*** la propono per 26 voĉoj, favoraj 7 kun 1 sindeteno. **Ne aprobita.**

6. **La organiza teamo** de la konferenco sub la gvido de Zsófia Korody konfirmita.

### ***Propono 2<sup>a</sup>:***

Ke estu akceptita la konsisto de la organiza teamo (Monique Arnaud, Marc Cuffez) por la tuta konferenca kunsidado.

Unuanime ***por*** la propono. **Aprobita.**

### **7. Starigo de laborgrupoj**

a – Gvidilo por kursgvidantoj – ne necesas laborgrupo ĉar estas la lasta momento por doni komentojn al jam farita laboro, sed interesitoj sin anoncu (komentoj petitaj de Katalin Kovats kaj Duncan Charters)

b – 1<sup>a</sup> laborgrupo pri Modula Instruista Trejnado en Esperanto (MITE) – kiel aspektus skemo por instrui instruistojn. Laborgrupo: Duncan Charters, Marija Jerkovic, Katalin Kovats, Ilona Koutny, Stefan MacGill, Enikő Zengő Sereghy, Mireille Grosjean (se eble), ***Neniu kontraŭ*** formiĝo de la laborgrupo. **Aprobita.** (Postnoto: La grupo renkontiĝis marde je 09.00 en la komitata salono)

(Retinformo: [http://www.ilei.info/Modula\\_skemo\\_SMG-ZK\\_Junio2013por\\_publiko.pdf](http://www.ilei.info/Modula_skemo_SMG-ZK_Junio2013por_publiko.pdf))

c – 2<sup>a</sup> laborgrupo – plurlingvaj varbiloj – resumi la edukajn argumentojn por Esperanto. Unue angla–Esperanta versio. Sekvos la franca. ILEI havas financadon de UEA, tial urĝas fari tion en la nuna jaro. Necesas finaprobigi la Esperantan tekston, je amplekso de 8 paĝoj kun la formato de IPR (DIN A5). Estus bone eldoni ĝin antaŭ la Ĝenerala Kunsido de UNESKO en Parizo en oktobro 2013, kvankam ili eldonos propran flugfolion kaj agos per tio.

Laborgrupo: Monique Arnaud, Duncan Charters, Mireille Grosjean, Stefan MacGill, Rob Moerbeek, Sinnöve Mynttinen. Laborgrupo **Aprobita.** (Postnoto: La grupo renkontiĝis lunde je 19.00h)

Gvidilo por Kursgvidantoj estos senpage havebla elektronike, kiel kontribuo al la mondo – neniu laborgrupo necesas por eldono, sed komentoj bonvenas.

8. **Jarraporto 2012.** Malgraŭ manko de definitiva jarraporto de la sekretario, necesis aprobi raporton por povi transiri al aliaj diskutoj kiuj dependas de ĝi. Pro tio ke la reverkita versio de la raporto de Stefan por la Revuo Esperanto (kun poste aldonita materialo) estis akceptebla, tio povus esti provizora bazo por agado, kaj se necese aprobo povus esti poste voĉdonota rete. La raporto devus esti de la estraro de ILEI pri ĝia laboro, do raportojn pri projektoj ekster ILEI kiel *edukado.net* kaj *lernu.net* aperas nur porinforme.

Devus esti du apartaj raportoj: tiu de ILEI pri la estrara laboro, kaj kompilita raporto de la agado de la sekcioj de ILEI (tio plene mankas). Pasintjare kaj tra lastaj jaroj, pro daŭra instigado, alvenis 75-80% de la raportoj.

### ***Propono 3<sup>a</sup>***

Ke la raporto de la Estraro verkita de Stefan fariĝu la jarraporto 2012, kun eblo ĝin modifi aŭ kompletigi.

32 *por*, 1 kontraŭ, 1 sindeteno. **Aprobata.**

(Atentigo de la Komitato: Estraranoj devas trovi anstataŭantojn por urĝaj taskoj se ili mem ne kapablas ilin kompletigi.)

(Postnoto: En la punkto post la kunsido alvenis raporto de la sekretario, kiu estos elprintita kaj konsultebla.)

## **9. Sekciaj raportoj 2012**

### ***Propono 4<sup>a</sup>***

La Komitato, notinte ke ne alvenis sufiĉe da raportoj de la sekcioj por povi fari kunordigan raporton, admonas la sekciojn atenti la statute devigan limdaton de la 31-a de marto por transdono de sekciaj raportoj.

**Aprobata** unuanime.

## **10. Financa raporto 2012**

La kasisto disdonis dokumenton kun la spezoj por 2012, la stato de la fondusoj kaj la BILANCO por 2012.

La Komitato dankis al la kasisto, Vilĉjo Harris, pro la farita laboro dum lia unua jaro kiel kasisto. Estis tre ekvilibra jaro, kun tre modesta deficino (nur kelkcentoj da euroj kompare kun buĝetita sumo de pli ol 4 mil eŭroj), kaj la kapitalo restis en bonega stato.

Demandojn oni direktu al: [ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)

Kelkaj notoj, demandoj, kaj komentindaj punktoj:

- Estus dezirinde havi ĉiujn bankkontojn en unu lando por faciligi la laboron.
- Ni ne elspezis la grandajn sumojn kiujn ni antaŭvidis por kelkaj projektoj, kio klarigis la neatendite modestan deficon. La rezulto de la Konferenco en Kunming estis modeste pozitiva – enspezo de 387 eŭroj.
- La kasisto faris tri malsamajn raportojn, sekvante la formon de la antaŭa kasisto, Julija Batrakova. Ne estis apartaj demandoj pri la prezentitaj raportoj krom la sekvaj.
- La kasisto esploras pri demando ĉu/kiel ILEI pagis la promesitan financon subtenon por la kursoj en Poznan (Interlingvistikaj Studoj UAM kiujn organizas Ilona Koutny).  
Postnoto: La pagoj kiuj estas devintaj okazi en februaro 2013 estis en la punkto post la kunsido solvitaj.
- Estis peto kontroli ĉu pagoj estis faritaj laŭ decido pri financa subteno por la projekto Interkulturo (Peter Balaz).
- Financa subteno por unu jaro ne daŭre restas havebla post la jaro se ne uzita.
- En 2012, praktike parto de la financa subteno de UEA helpis kovri la ĝeneralan deficon de ILEI.

Plia diskutado de la raportoj, kun fino de punktoj 11-13, okazu ĉe la sekva Komitat-kunsido, okazonta lundon 9h00 –10h30.

DC, 2013-7-14